

BELGA ESPERANTISTO

46a Jaro — N-ro 3a — Marto 1954a

Fondita
en 1908a

Redaktoro-Administranto

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44

Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO



Abonprezo:

Fr. 100,-

Dudek Jaroj forpasis . . .



Frans Schoofs

laŭ desegnaĵo, farita en 1928, de lia bofrato, la pentristo Léon Brunin, okaze de la XXa Universala Esperanto-Kongreso, kiun li prezidis.

Dudek jaroj forpasis de la tempo kiam, — en malpli ol unu monato —, la belgaj esperantistoj estis plej kruele trafataj pri kies sinsekvaj, same subitaj forfaloj de amataj gvidantoj:

La 17an de februaro 1934 falis de roko apud Marche-les-Dames, la Reĝo Alberto, pri kies eminentaj kvalitoj memorigis, ĵus antaŭ kelkaj tagoj, ĉiuj ĵurnaloj en la lando, kaj kiu estis ŝatata, kaj ni povas diri amata, de la tuta Nacio.

Unu el la en sia koro plej forte vunditaj, certe estis la tiama prezidanto de Reĝa Belga Ligo Esperantista Frans Schoofs, kiu, dum la tuj postaj renkontiĝoj, vere ne povis silenti pri tiu kruela sorta bato, trafinta la landon kaj kiu, en la fortoco de sia 46a jaro, ploris pro tiu funebro.

Li ja ne eksciis, tute ne eksentis, ke

lin atendas, en plej baldaŭa estonto, sorto simila.

Sed post malsaneto, apenaŭ du-tritaga, li subite estis forrabata al la amo de sia familio, al la amikeco de siaj multnombraj konatoj, ne nur en la lando, sed en la tuta mondo.

Car Frans Schoofs ne estis nur gvidanto de la nacia movado, li ankaŭ estis la sekretario de la Konstanta Reprezentaro de la Esperanto-Movado, la plej alta tiama instanco, kiun la esperantistoj starigis por gvidi la batalon por nia Idealo.

Tiu morto, kiu okazis la 12an de marto 1934, — apenaŭ kelkajn semajnojn post la akcidento de la Reĝo —, kaŭzis grandan emocion inter la samideanaro kaj la enteriga ceremonio iĝis unu el la plej gravaj renkontiĝoj de la esperantistaro en Belgujo.

U.E.A. sendis, por lastfoje saluti la gvidanton kaj la amikon, S-ron Hans Jakob, kiu speciale veturis el Genève; Reĝa Belga Ligo, la antverpena Grupo „La Verda Stelo“ kaj Belga Esperanto-Instituto aŭdigis sian honorsaluton per la voĉoj de S-roj Leon Cogen, Hector Boffejon kaj Maurice Jaumotte kaj la katafalko, kovrita per la esperanto-flago, dronis en floramaso, en kiu kronoj kaj garboj, ne nur de la cititaj instancoj, sed de ĉiuj grupoj de Belga Ligo, de la „Flandrema Grupo Esperantista“ kaj de multaj individuaj amikoj, dum la flago de la Antverpenaj Policistoj Esperantistaj akompanis la mortinton en la sekvantaro al la tombejo, kie vera esperanto-monumento estas poste starigita, honore de tiu, kiu dediĉis sian tutan vivon al Esperanto.

Kaj, post dudek jaroj, fidelaj konservantoj de lia mesaĝo, fidelaj sekvantoj de lia ekzemplo, ni iros kune, — unufoje pli —, saluti lin kaj atesti antaŭ li, ke lia laboro ne estis vana, ke la esperanto-movado, — malgraŭ la grava milita bato, kiu ĝin intertempe kaj refoje trafis —, denove staras fortika kaj bela; pli bela kaj pli promesdona ol iam!

Maur. Jaumotte.

Niaj Kongresoj

La Antaŭkongreso en Antverpeno

La L.K.K. por la Antaŭkongreso, kiu okazos en Antverpeno, de la 28a ĝis la 30a de julio, dissendis, antaŭ kelkaj tagoj, la detalajn informojn pri tiu ĉi okazantaĵo al ĉiuj naciaj societoj, revuoj, karavanestroj, k.t.p., ne nur en la ĉirkaŭantaj landoj, sed ankaŭ tra la tuta mondo.

Ĝi do atendas, en iom baldaŭa estonto, la unuajn informojn pri la interesiĝo, kiun vekos en larĝaj rondoj tiu iniciato, kiu permesos al multaj kongresontoj de Haarlem, — antaŭe jam, — ĝui tri agrablajn tagojn en internacia, samideana rondo.

Pliajn novaĵojn ni publikigos en la sekvonta numero, sed jam de nun, la kotizo por tiu Antaŭkongreso, — nome Fr. 50,—, povas esti pagata al la P.C.K. de la L.K.K.-kasisto: S-ro A. Pittoors, Deurne: No. 40.89.41.

La adreso de la L.K.K. estas, kiel jam dirite, ĉe la sekretario: S-ro H. Sielens, Houwerstraat 12, Antverpeno.

La Beneluksa Kongreso en Lieĝo

La L.K.K. de la Beneluksa Kongreso 1954 en Lieĝo daŭrigas senlace siajn klopodojn por la sukcesigo de nia pentekosta festo.

Dum la lasta kunsido, la membroj eksciis pri kelkaj bonaj novaĵoj:

La Honora Komitato: Je tiu momento, jam akceptis esti membroj de la Honora Komitato:

Ministro de Publika Instruo, P. HARMEL;

S-ro P. Gruselin, urbestro de Lieĝo; S-ro Olympe Gilbert, unu skabeno, skabeno pri Civila Stato kaj pri Belartoj;

S-ro Destenay, deputito, skabeno pri Publika Instruado kaj pri Sportoj;

Kaj ĉiuj aliaj skabenoj;

S-ro Petry, provinca estrarano;

S-ro J. J. Merlot, urbestro de Seraing (N.d.I.R.: filo de la ŝtatministro).

La L.K.K. mem akceptis en siajn rangojn: S-ron Van der Meersch, ofi-

Honorigo

En sia oficiala ministra domo, nia Cefministro Van Houtte mem pinglis sur la bruston de nia Ĝenerala Sekretario-Kasisto la insignon de Kavaliro en la Kronordenon, kiun la Reĝo atribuis al S-ro Henri Sielens, kasisto de la Asocio de Belgaj Ĵurnalistoj (Sekcio Antverpeno-Limburgo).

Al li iras la oficialaj kaj ankaŭ la amikaj gratuloj de la administrantaro kaj membraro de R.B.L.E.

ciston en la Lieĝa Oficejo pri Turismo, kiu do certe multe povos faciligi diversajn laborojn kaj kiu jam montris sian laboremon, tradukante esperantan turisman dokumenton pri Lieĝo.

Tiu tradukaĵo sur aparta folio estas enŝovata en la originalan 4-lingvan prospekton; kaj citinda estas la fakto ke, en 1953, la Lieĝa Oficejo ricevis 116 petojn, esperante redaktitajn, pri turismaj informoj rilate al Lieĝo.

La Programo: La kunsidoj de la Kongreso okazos en „Hôtel Vénitien“, Place de la République, same kiel la vesperfestoj; dum la festeno estas antaŭvidata en la granda magazeno „Vaxelaire-Claes“, Place Maréchal Foch.

La lunda ekskurso iros persipe al HUY kaj la tagmanĝo okazos en la salono de la „Sté. Royale d'Harmonie“, Promenade de l'Ile (apud la Teatro).

Aliflanke, estos Abato Muller, kiu diros la Meson en la Preĝejo „Sanktega Sakramento“.

Radio: Klopodo farita, laŭ sugesto de S-ro Desonay, ĉe Radio-Lieĝo havis la sekvantan sukceson: la stacio de Lieĝo disaŭdigas, dum la monato majo, la informojn, kiujn la L.K.K. transdonas al ĝi. Tiuj ĉi disaŭdigoj okazos ĉiutage kaj ĉiuvendrede je la 12,55a.

Peto: Atendante la definitivan aliĝilon, kiun ĉiu abonanto ricevos kun sia revuo, tiuj, kiuj ne jam pagis sian kotizon, estas petataj tion TUI fari, por ke la L.K.K., iom post iom, pli ekzakte sciuj por kiom da partoprenontoj devas esti antaŭvidataj la diversaj aranĝoj.

Nunmomente, la kotizo estas ankoraŭ Fr. 50,—, kiuj povas esti pagataj al la Poŝtekkonto No. 10.06.30 de la Beneluksa Esperanto-Kongreso, St. Gilles.

S.S.S.

Post sukcesinta Sveda Somera Semajno 1953 en Frostavallen, la SSS 1954 okazos en la sama loko de 8 ĝis 15/8, do tuj post la U.K.

Frostavallen situas en la suda parto de Svedlando kaj estas facile kaj gustatempe atingebla. La nombro de partoprenantoj estas limigita (80 pers.). Oni do senprokraste anoncu sin ĉe sro J. Strönné, Amiralsgatan 36, Malmö.

La ĉefaj temoj estos Unesko, Eŭropa Konsilantaro kaj la ĉefprelegistoj: Prof. I. Lapenna (Jugosl.), Docento S. Prágano (Nederl.) kaj Dro J. Szilagy



39a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - HAARLEM

Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando.

31-an julion - 7-an aŭguston 1954

Feb. 1953

OFICIALA KOMUNIKO

N-RO 5

Pagoj: Rotterdamsche Bank, Haarlem.

Poŝtgirkonto 604997.

L.K.K. akceptas nur pagilojn ŝanĝeblajn en banko. Ĝi absolute ne povas akcepti varojn aŭ librojn kiel pagon. Nepre sendu la pagon kaj la aliĝilon al la sama instanco, ĉu al L.K.K. ĉu al peranto.

Dua Bulteno: Jam estas sendita al ĉiu aliĝinto. Ĝi ne estas por ĝenerala disdono, tial bonvolu ne peti kvantojn.

Mendoj: Kun la Dua Bulteno estas instrukcioj pri mendoj kaj Oficialaj Mendiloj. L.K.K. atentigas, ke ĝi ne traktos mendojn sen tiuj oficialaj dokumentoj, kiuj estas parto de la administra sistemo.

Honora Protektanto: La L.K.K. havas la honoron kaj plezuron sciigi, ke akceptis esti Honora Protektanto de la 39-a Universala Kongreso de Esperanto D-ro Willem Drees, Ministro-Prezidanto de Nederlando.

Arta Vesperto: La komunumo de Haarlem esprimis sian intencon aranĝi por la kongresanaro grandiozan koncerton de muziko (orgeno kaj solistoj) en la Granda Preĝejo de S-ta Bavo en unu vespero de la kongresa semajno.

Teatra Vesperto: La L.K.K. anoncas, ke ĝi aranĝis prezenton de teatraĵo en Esperanto. Rolos profesiaj aktoroj kiuj tiucele studas la lingvon. La prezento okazos en tri sinsekvaj vesperoj en la Urba Teatro de Haarlem.

Parolfilmo: La Ministerio por Eksterlandaj Aferoj entreprenas filmon en Esperanto „Lando kaj Popolo“, kiun ĝi disponigos por uzo dum kaj post la kongreso.

Limdato/Limcifero: Sekve de la eksterordinare granda aliĝo de kongresanoj en ĉi tiu frua stadio la L.K.K. denove avertas pri la fakto ke la partopreno estas limigita je ĉ. 2000 kongresanoj. Estas tre verŝajne, ke tiu cifero estos atingita tre baldaŭ. Ĉetere L.K.K. ne akceptos aliĝojn post la fino de junio. Por eviti ĉagrenon nepre aliĝu jam tuj!

Statistiko (gis fino de jan.): Aŭstrio 12, Belgujo 40, Brazilio 3, Britujo 218, Danujo 33, Finnlando 25, Francujo 178, Germanujo 120, Hispanujo 5, Indonezio 1, Italujo 50, Japanujo 1, Jugoslavio 50, Kanado 4, Madejro 1, Meksikio 2, Nederlando 437, Norvegujo 50, Novzelando 9, Portugalujo 5, Svedujo 130, Svislando 17, Turkujo 2, Usono 7. Sumo el 24 landoj 1400. (pasintjare 708).

Mason Stuttard,

Konstanta Kongresa Sekretario

La kasisto atentigas la anojn kiuj intencas ĉeesti ĝin ke post ĉi-tiu monato la kotizoj ree plialtiĝos.

Ili nun ankoraŭ estas 22 Gd. (por Individuaj membroj de UEA: 19,50 Gd.)

Edzinoj pagas la duonon de tiuj prezoj.

Junuloj (malpli ol 20 jaraĵ) kaj studentoj: 7,50 Gd.

1 Gd. vi kalkulu je 13,50 Fr. kaj pagu je P.C. 13.37.67 de Reĝa Belga Ligo Esperantista, Antverpeno.

Baldaŭ la enskriboj atingos la 2000 kaj tiam estos tro malfrue por ankoraŭ partopreni!

Peto

Sekve al miskompreno, propagand-ekzempleroj de niaj numeroj 1 kaj 2 estis sendataj tiel grandnombre, ke restas al ni nesufiĉaj ekzempleroj de tiuj ĉi numeroj por sendi al la tiun ĉi jaron ankoraŭ varbotaj membroj-abonantoj.

Ni tial petas ke tiuj, kiuj ricevas en sia familia rondo du ekzemplerojn kaj tiuj kiuj tamen ne konservas nian revuon, bonvolu resendi la sian al nia administracio.

Koran dankon al la bonvolemluloj!

Plursenceco kaj Metaforeco en Esperanto

Unu el la plej rimarkindaj lingvofenomenoj kiujn la akurata leganto senĉese povas observi en la literaturo, estas la plursenceco de vortoj kaj frazoj. En ĉiuj naturaj lingvoj, ĉu historiaj ĉu modernaj, en parolo aŭ skribo, la plursenceco okupas neatendite gravan lokon. Kiu iam legis verkon de eminenta aŭtoro, nacilingvan aŭ esperantan, estis tuj kaj nerezisteble frapita de ĉiam denove mira, intensa pensludo, vestita en ĉiaj lingvo-figuroj, inter kiuj plejofte dominas klare la plursenceco.

Ĝenerale plursenceco estas propreco de ĉiuj lingvoj; sed en prilingvaj konsideroj de diversaj esperanto-gazetoj oni jam plurfoje — kaj prave — atentigis la fakton, ke en planlingvo la problemoj ĉirkaŭ la plursenceco prezentigas alie ol en naturaj aŭ naciaj lingvoj. En planlingvo ekz. „idiotismoj“ estas nepre malrekomendindaj, dum en naciaj lingvoj oni same nepre povus pravigi la uzon de „idiotismoj“. Konstatenda, ke en naciaj lingvoj pri jes- aŭ nerekomendindeco de iu esprimo decidis unualoke la fakte ekzistanta (do ofte plene arbitra!) lingva tradicio kaj nur dualoke la popola logiko. En planlingvo tamen la logiko estas la plej decida faktoro, dum la fakta internacia konateco, de iu vort- aŭ esprimsenco povas maksimume liveri aldonan, dualokan kriterion.

Parolante pri logiko en la planlingvo, oni povas meti la demandon: kia logiko kapablas plej klare kaj kontentige solvi planlingvajn problemojn? La respondo donis la tuta historio de la Esperanto-movado ĝis nun! Ĝi nekontesteble pruvas, ke nur scienca, ne popola logiko realigis plej bonan rezulton. Pozitive oni povas konkluditi el la fakto, ke la decidoj de la Akademio montras sciencajn difinojn kaj priskribojn, dum la iamaj moko kaj miskreditigo ĉirkaŭ la „logiko“ inter niaj gramatikistoj firme konjektigas, ke en multaj prilingvaj artikoloj la popola logiko anstataŭis la sciencon, kaj favoris la skeptikulojn.

Per plursenceco en vasta signifo oni ofte komprenigas ankaŭ certajn „najbarajn“ nociojn, kiaj ekz. metaforeco.

Tamen inter plursenceco en strikta signifo kaj metaforeco estas grava diferenco. Metaforeco koncernas nur eksteran, akcesoran (arbitran) similecon inter du aferoj aŭ ecoj. La astronomo ekz. parolante pri stelgrupo „La granda Urso“, tute ne opinias per tiu esprimo konstati esencan internan similecon inter diversaj vort- aŭ esprimsenstelgrupo. Kontraste al metaforeco plursenceco en strikta signifo tamen rilatas ĉiam esencan, internan similecon inter diversaj vort- aŭ esprimsencoj. Konstatante ekz., ke la vizaĝo de mia amiko montras „sanan“ koloron, kaj ke la kuracisto donis al sia paciento „san(ig)an“ medicinon, oni ja komprenigas, ke la saneco de la vizaĝokoloro estas signo de saneco, kaj ke la medicino de nia kuracisto estas ilo por saneco. Tamen la vera, unua kaj plena senco de „sana“ koncernas la bonstatan organismon de vivanta estaĵo, kaj la aliaj t.n. ĉefsenoj (ekz. signo kaj ilo de saneco) partoprenas la ĉefsencon de „bonstata organismo“ k.t.p. Kaj ĉi tie klare temas pri esenca, ne pri akcesora, aŭ arbitra simileco, kian oni renkontas ĉe metaforaj esprimoj.

Ĉar al Esperanto kiel internacie komprenenda planlingvo ne povas manki la logiko, kaj la strikta plursenceco, grandparte rezultiĝas ĝuste el tiu sama logiko, estas kompreneble, ke tiu ĉi plursenceco ne kaŭzis tiom da lingvaj diskutoj, kiom la metaforeco, kiu ĉefe dependas de tradiciaj, rutinaj faktoroj. Ĝuste sur la tereno de tiu ĉi metaforeco atendas la estontan esperantologion ankoraŭ grava sed interesa tasko!

F. Winkel.

IDILIO

Si, la denaska belulino,
Li, ver-barbaro ĝis la fino.

Si, ungoaro ruĝlakita,
Li, la fasado brunbakita.

Frenezaj ambaŭ kaj ebriaĵ
Pro riceprokaj ĉarmoj siaj.

Li petas: ĉu?
Si flustras: jes.

Pli ol feliĉaj ili estas
en ĝarden' Aranjuez.

A. D.

La Tradukmaŝino

En multaj tagjurnaloj, antaŭ kelka tempo jam, aperis interesa atrikolo, kies traduko sekvas:

New-York, 8an de januaro (A.F.P.)

Sensacia utiligo de la elektronika kalkulmaŝinoj estis prezentata en New-York. Kalkulmaŝino „I.B.M.“ sukcesis traduki en taŭgan anglan lingvon proksimume sesdek ruslingvajn liniojn. La rusa lingvo estis elektata pro sia malfacileco kompare kun okcidenta lingvo. La ruslingvaj frazoj markitaj sur traboritaj kartoj reeliris el la maŝino post ses ĝis sep sekundoj, tradukitaj anglalingven sur rulo simila al tiu de skribmaŝino.

La teknikistoj, kiuj plenumis la elmontradon, akcentis ke, por ke la traduko estu tute fidela, estis necese devigi la maŝinon fari la sintaksajn akordigojn kaj havi konsideron pri la gramatikaj nuancoj. Tio estis realigata dank' al la registrado fare de la „elektronika memoro“ de la maŝino, de speco de „vortaro“ de faktoroj (elektraj impulsoj), kiuj devigas la maŝinon „elekti“ inter la diversaj signifoj de vortoj tiun kiu ekzakte konvenas. Necesas plie ke la elektita vorto okupu en la frazo la taŭgan lokon.

Ekzemple, la rekta komplemento kiu, en la rusa lingvo ĝenerale troviĝas antaŭ la verbo, troviĝas male en angla lingvo post la verbo kaj la maŝino devas efektiviĝi la necesan inversion.

La tiel nomata „vortaro“, kiu servas por la elmontrado, entenis nur proksimume du cent kvindek vortojn kaj nur simplaj frazoj estis donataj por traduki al la maŝino. La teknikistoj rimarkigis ke neniu tradukmaŝino estas nun pretita por esti liverata al la merkato kaj ke temis nur pri provado ke ordinaraj elektronika kalkulmaŝino estas kapablaj decifri kodvortaron. Restas nun la tasko finpretigi kompletajn vortarojn por ĉiu el la lingvoj tradukotaj.

La porparolanto de la firma ĉe diris ke la realigo de parolanta tradukmaŝino estas nuntempe teorie ebla kaj konkludis: „Estas verŝajne ke la samtempa traduko, tia kia ĝi nuntempe ekzistas en la Unuigintaj Nacioj, okazos post dek aŭ dekkvin jaroj nur per maŝino.“

Ĝis tie la traduko, espereble sufiĉe fidela, kvankam ne maŝina.

La legado de tiu artikolo igas iom revema. Ĉu estas kredebla ke la streĉa traduklaboro, kiu postulas ne nur la helpon de fidindaj vortaroj, sed jarojn da studado ĝis plena posedo de la ĉu koncernaj lingvoj, ĉu estas kredebla ke tiu laboro estos iam farata de maŝino, en kiu oni enmetos ekzemple rusan

Aforismoj

pri . . . la ESPERO

Ni povas vivi sen ia ĝojo sed ne sen a espero.

EÖTVÖS.

Kiu estas poeto kia la espero; kiu tia pentristo kia la memoro!

Grafino DIANE.

Neniu pli dolĉa sufero ol esperi.

LEHMANN.

El jarcento sen espero naskiĝas jarcento sen timo.

MUSSERT.

Amo povas esperi kie racio malesperus.

LYTTLETON.

Espero estas la dua animo de la malfeliĉuloj.

GOETHE.

Esperi ĉiam estas feliĉo kaj ofte kuraĝa ago.

E. RENAN.

tekston unuflanke por tuj ricevi je la alia flanko tute korektan anglan tekston, kiel buĉisto kiu metas viandon en sian muelilon kaj ricevas kolbasojn je la alia ekstremaĵo? Se vere post dek aŭ dekkvin jaroj tiaj maŝinoj estos ĉiuloke haveblaj kaj uzeblaj, ĉu utilas ankoraŭ propagandi nian internacian lingvon?

La moderna tekniko faris jam tiajn miraklojn ke ni eble ne rajtas dubi pri tiu nova mirindaĵo. La telegramo kiu anoncas tiun sensacian novaĵon estas datumita de la 1-a de aprilo kaj tamen ĉu ni ne devas timi iun usonan blufadon?

Kiu vivos, vidos. Sed intertempe ni povas nur konstati ke la homaro plirapidigas siajn paŝojn sur vojon kiu ŝajnas al ni erara. Ĝi volas ĉion solvi per la plej materia tekniko kaj forgesas la pli subtilajn sed verŝajne pli sekurajn vojojn de la spirito. Nia solvo: internacia helpingo por ĉiuj homoj estas ege pli simpla, pli malmultekosta kaj certe pli efika.

Se iam vere ekzistos tradukmaŝinoj, ili estos ege komplikaj, multekostaj kaj nur uzeblaj por potencaj organizaĵoj kiel la Unuiĝintaj Nacioj aŭ registaroj de riĉaj ŝtatoj. La simpla homo neniam povos vojaĝi tra fremda lando kun tradukmaŝino sur sia dorso kaj por ke li havu kun siaj homfratoj el ĉiuj terzonoj tiun intiman kontakton, kiun donas nur komuna lingvo, li ĉiam povos plej efike uzi tiun facilan Esperanton, kiun donacis al ni la spirita geniulo Dro Zamenhof.

Sa Pu Pej.

IMPRESOJ PRI USONO *)

Kelkaj postvojaĝaj notoj

Kiam nia avo rakontis al ni pri „sia” malnova tempo, ni penis revivi en nia imago la bildojn de tiu pasinteco. Sed, nek la priskribo de la vortoj, nek la vido al malnovaj flavigintaj fotografiaj povis, por la nuna generacio, rekrei la vivon de niaj geavoj.

Sed Eŭropano povas ja vidi la mondon kia ĝi estos por la sekvanta generacio, vizitante la Unuiĝintajn Ŝtatojn de Norda Ameriko.

Jen, jes la ĉefa, plej elstara impresio kiun oni havas, kiam oni vidas Usonon por la unua fojo: oni vidas en la estontecon!

Apenaŭ fantazieblaj urbegoj de betono kaj ŝtalo tra kiuj la rektaj stratoj estas kvazaŭ tranĉitaj, formantaj relative mallargajn, mallumajn profundajn fendojn en kiuj la homoj neniiĝas al sensignifaj mikroboj.

Ĝisfunde meĥanikita vivo, en kiu la homa energio limiĝas je butonpremo.

Salajroj tiel altaj kaj prezoj relative tiel malaltaj ke la vivnivelo estas tri, kvar kaj, kompare al tiuj en iuj pli postrestaj landoj, eble ĝis dek fojoj, pli alta ol la nia, tiel ke laŭ niaj normoj, laboristoj ĝuas riĉan vivon.

Enviinda kvazaŭ-foresto de senlaboro, tiel ke trovi laboron estas por ĉiuj pli facile ol trovi laboristojn.

Nekredeble granda federacio de 48 landoj kie oni parolas nur unu lingvon kaj kie neniu landlimo ĝenas iun ajn; nekredeble bela lando, vasta kiel kontinento, same varia kiel kontinento kaj ĉio ĉi - je ĉies ĝueblo en plena libereco.

La aŭtomobilo en posedo de ĉiu familio, la grandaj financaj rimedoj kaj la 40-hora semajno same kun la liberigo prezentita de 48 ŝtatoj sen la malhelpo de landaj limoj, naciaj malkomprenejoj kaj diversecoj de moroj kaj lingvoj, tuto kiu estigis en Ameriko vivmanieron tiel malsimilan al la eŭropa ke ĝi kaŭzas al ni iom da kapturniĝo.

Sed, ĉe lia unua kontakto kun tiu lando de nelimigeblaj ebloj, la eŭro-

panon ankaŭ trafas amerikanaj ecoj, kiuj iom ŝokas.

Konsterniga manko de tio kion ni nomas kulturo: manko de bonmanieroj, manko de sindetenemo, manko de respekto kaj manko de modesteco.

Nekredebla disvolvado de la privata iniciatemo kaj preskaŭ kompleta apatio fare de la ŝtataj aparatoj, pro kio ĉiu devas helpi sin mem: nenio oficiala subvencio aŭ helpo ĉe sociaj malhelpaĵoj estas antaŭviditaj.

Se la Eŭropa politiko ne estas komprenebla por la Amerikanoj, ankaŭ la usona politika sistemo estas same ne sondebla por la Eŭropanoj; ĝi ŝajnas al ĉi tiuj kruda kaj ne tre demokratika. Fakte terura kaj por ni neniel imagebla miksado de krimeco kaj politiko kun la juĝistaro.

Sed se la Usonano emas fanfaroni pri siaj progresemaj efektivigoj, li ankaŭ senhezite kaj senkaŝe montras al vi la nebonaĵojn de la amerikanismo. Kio estas simpatia!

La Usonano estas suprizi religiema, sed adoras monon pli ol ion ajn surtere, li estas samtempe malavara kaj egoisma, bone edukita kaj infane naiva. La junularo estas studema kaj malpli supersata ol ĉe ni; knaboj kaj knabinoj multe sportas sed ofte devas labori, eĉ tre junaj, por havigi al si poŝmonon. Mia impresio estas ke la usona junularo estas — klare kaj morale — pli bone ekipita por la posta malmilda vivo ol la nia.

Mia finkonkludo?

Mi ne povas finkonkludi. Ĉu oni envere povas kompari la estontecon kun la estanteco? Ĉu oni envere povas kompari nian malnovan, kulturplenan sed disŝiritan kaj heterogenan Eŭropon kun la tutjuna, unuiginta kaj sentradicia Nova Mondo?

Kaj nia tasko do estu ne la esploro kaj serĉado de tio, kio plaĉas al ni en tiu nova mondo sed male la malkovro de kio estas kopiebla kaj kopiinda.

F. VAN DOOREN.

*) La aŭtoro de ĉi tiu kontribuo restadis en 1953 dum 10 semajnoj en Usono, aviadilante de grava loko al grava loko (Red.).

BELGA KRONIKO

Lieĝo, urbo de Beneluksa Kongreso 1954

Cefurbo de Valonujo, malnova cefurbo de samnoma episkopa Princlando, Lieĝo, pordo de la Ardenoj, estas urbo kiu, kun antaŭurboj, nombras pli ol 400.000 loĝantojn. Ĝi situas sur la fervojlinioj Bruselo/Kolonjo, Parizo/Varsovio, Amsterdam/Luksemburgo/Basel.

Pri ĝia situacio en la invada epoko, onikonasnenion. Oni eĉ ne scias, ĉu la Barbaroj trovis en ĝi ion de truindan. Oni nur scias ke, dum la Romana epoko, la lando apartenis al riĉaj nobeloj. Sed la Frankoj perforte kaptis ĝin kaj, dum longa tempo, Lieĝo farigis reĝa propraĵo.

En la jaro 705, la episkopo S-ta Lamberto estis, en Lieĝo, mortigata de rabistoj. Al li kaj al liaj mortigitoj la urbo ŝuldas sian gloron; ĉar pro pieco al S-ta Lamberto, lia posteulo, S-ta Huberto, translokiis la sidejon de sia episkopejo de Tongeren al Lieĝo. De tiam naskiĝis la Lieĝa Lando.

La unua Princ-Episkopo de Lieĝo estis Notger, elektita en la jaro 972 de la germana imperiestro Oton la Granda. Poeto, kies nomon mi ne konas, skribis:


O Liège qui des lois portes le joug léger.

Tu dois Notger au Christ et le reste à Notger.

Notger, dum 36-jara regado, fortikigis la urbon, kiu sukcesis kontraŭstari la avidojn de siaj potencaj najbaroj, la dukoj de Brabant. Jam en tiu epoko, Lieĝo estis prospera urbo kaj granda centro de civilizacio: ĝia kultura kaj arta famo alnomigis ĝin: „la Norda Ateno” . . . Ĝi estis jam cefurbo, kiam en nia lando ekzistis neniu alia. En la XI-a jarcento, Lieĝo farigis unu el la plej brilaj centroj de arto kaj intelekto kaj, ĝis la franca revolucio, la Lieĝa Princlando ludis gravan rolon en la belga historio.

Pro ĝia turmentoplena vivo, Lieĝo estas ankaŭ alnomita: „La Arda Civito” (la Cité ardente), laŭ la titolo de la bela romano verkita en 1905 de Grafo H. Carton de Wiart. Plurfoje la urbo estis senremparigata, eldetruata, cindrigata, sed, spite ĉion, ĝi ĉiam revivigis. Multaj konstruaĵoj postvivis la batojn de la ŝtormoj kaj atestas la vivpovon de Lieĝo. Inter ili estas citindaj: la malnova Palaco de la Princoj-Episkopoj; la romanoj kaj gotikaj preĝejoj: S-ta Jakobo, vera ŝtonpunto; S-ta Paŭlo kun ĝia malnovarta trezoro; S-ta

OFFICE DU TOURISME
PLACE S^t LAMBERT
ET GARE DES GUILLEMINS
BELGIQUE



TOURISME · ART · FOLKLORE

Martino, staranta super la urbo: S-ta Kruco kun ĝiaj tri samaltaj navoj; S-ta Bartolomeo kun ĝa bela baptujo. Ni citu ankaŭ la muzeojn de Belartoj, de Armiloj, Curtius, Ansembourg, Grétry, Valona Vivo. Ĉiuj meritas viziton kaj pravigas vojaĝojn de turistoj.

La Universitato, kun ĝiaj 3.000 studentoj; la Reĝa Muzikkonservatorio kaj ĝia fama skolo de violono (Ysaye, Thomson, Marsyck, Musin, Massart, k.t.p.); la Akademio de Belartoj, la Liceo Léonie de Waha, multaj lernejoj mezgradaj kaj teknikaj, multnombraj artaj kaj literaturaj kluboj kompletigas gravan kulturen tuton.

Ĝia historio, ĝiaj monumentoj, ĝia prospera industrio, ĝia rava pejzaĝo faras de Lieĝo grandvaloran turistan centron. La urbo etendiĝas ĉe la bordoj de la du kunfluantaj riveroj - Mozo kaj Urto - kaj levas sin kvazaŭ amfiteatro kun arboĝarnitaj montetoj, de kie oni ĝuas imponajn panoramojn. Promenado al la plataĵo de Cointe aŭ al la Parko de la Citadelo lasas al la vizitanto ne-forgeseblan memoradon.

Urbo de laboro, Lieĝo estas vigla kaj gaja; en ĝi oni povas distriĝi, en ĝi oni povas ĝui fratan gastamecon.

Esperantistoj, Lieĝo vokas vin! Venu grandnombre al nia beneluksa kongreso! (Esperantigis: J. S.)

Por viaj esperantaĵoj, libroj, insignoj k. c.

Belga Esperanto-Instituto

26, Oostenstraat, 26
ANTVERPEN

kiu ankaŭ havigos al vi nacilingvajn librojn, revuojn kaj gazetojn, kaj ĉiuspecan skribmaterialon.

ANTVERPEN

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo”

(Poŝtĉeknumero: 726.54)

La 22an de januaro, S-ro Frans Van Dooren paroladis pri „Miaj Impresoj pri Usono”. Dum pli ol du horoj li rakontis pri siaj spertoj kaj travivaĵoj dum studvojaĝo de tri monatoj en la plej diversaj regionoj de Usono. Li skizis la vivon kaj la morojn de la ofte malsimilaj popoloj en tiu grandega lando, pritrakis la problemon de la indianoj, de la nigruloj kaj multajn aliajn aspektojn de la ĉiutaga vivo. Tiun interesan paroladon li ilustris per cento da belegaj kolorigitaj lumbildoj, kiujn li mem fotografis dum sia vojaĝo. La varmaj dankvortoj de la prezidanto, kiuj sekvis koran aplaŭdon de la multnombra publiko, esprimis la dankemon de ĉiuj.

La 29an okazis la diplomdisdono al 17 ĝelernintoj de la elementa kurso, gvidita de F-ino Henny De Ketelaere. Post ardaĵ vortoj de la prezidanto, kiu instigis ĉiujn daŭrigi la studadon de nia lingvo, ricevis la diplomon: F-ino Laura kaj S-ro Kris Leemans, S-ino J. Vanderschueren, S-ro W. Deroisy, S-ro J. De Hoog, S-ro G. Vanderschueren, F-ino Ph. Opdebeek, S-ino Cammaert, S-ro A. Van den Plas, S-ro M. Blajwas, S-ro A. Cassiers, S-ino B. Piedfort, F-ino Lea Leemans, S-ro A. Van der Roest, F-ino J. Tyck, dum speciala diplomo „kun honoriga mencio” estis transdonata al F-ino Chr. Cammaert kaj F-eto G. Verhoeven, kiuj ankaŭ faris la ekzamenon sed kiuj, pro sia juna aĝo, ne povis esti envicigataj en la ordinaran liston.

Nome de la ĝelernintoj, S-ro W. Deroisy tre sprite kaj ŝerceme alparolis la profesorinon, kiun li varme dankis, dum estis donacataj al ŝi ĉarma arta statueto kaj bela florgabro. Kortusita, F-ino De Ketelaere dankis kaj tuj anoncis ke ŝi volonte reprenos la duan kurson, kiun antaŭ kelkaj semajnoj komencis S-ro Jaumotte. Tiu ĉi sia-vice ankaŭ dankis la profesorinon nome de la estraro.

Kaj tuj sekvis Kabareda Vespero, certe interesa por la novuloj kaj al kiu partoprenis S-ino E. Truyens, S-ro K. Ameryckx kaj P. Peelman, en kantoj kaj skeĉoj; S-

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPEN O

— Por via MUZIKO,
RADIO kaj GRAMOFONO

ro A. Verhoeven, kiu deklamis; S-roj W. Van Nereaux kaj J. Vinck, lertaj muzikistoj, kiuj en skeĉo „Geneveva de Brabanto” same montris ludtalenton, kune kun F-inoj J. Ameryckx kaj Lea Vinck kaj la juna S-ro F. Ameryckx. Menciindaj ankaŭ estas S-ro J. Van Nereaux ĉe la pianoforto kaj S-ro K. Van Gompel, kiu kun S-ro P. Peelman enkondukis la numerojn kaj ankaŭ partoprenis al la efektivigo de programo, kiu akiris belan sukceson, kiun la prezidanto per laŭdaj vortoj substrekis.

Pro la akra malvarmeco, la parolata ĵurnalo de la 5a de februaro ne estis ĉeestata de la kutima membronombro, sed ĝis tamen unu el la plej bonaj, dank’ al la kunlaboro de S-ro H. Vermuyten, la kritikemulo; F-ino H. Toussaint, la flegantino de la „punkaso”, kiu laŭ prezentita raporto, bonege fartas; F-inoj H. kaj M. Hofkens, F-ino H. De Ketelaere, S-ro K. kaj F-ino J. Ameryckx; S-roj R. Van Eynde, R. Balleux, J. Montmirail kaj J. Verstraeten.

La 12an, sesdekkvin membroj denove ĉeestis por la filmprezentado de S-ro R. Van Eynde, kiu dum preskaŭ du horoj montris belegajn kaj interesajn filmojn, artajn, sciencajn, amuzajn, folklorajn, muzikajn kaj la espero esprimita de la prezidanto pri pliaj tiaj vesperoj, tre certe ankaŭ estis tiu de la publiko, kiu estis vere dank’ pro la bela vespero.

Programo de la venontaj kunvenoj:

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw”, Frankrijklei, 4 je la 20, 30a (1-a etaĝo).

Marto (memorigo): la 5an: Parolata ĵurnalo; la 12an: Parolado kun lumbildoj de S-ro R. Balleux, pri: „Vojaĝimpresoj”; la 19an: S-ino Ety Graeffe parolados pri „Ameriko”; la 26an: kabaredo vespero.

Aprilo: la 2an: Parolata ĵurnalo; la 9an: Amuza vespero; la 16an: Sankta Vendredo.

BRUGO

Bruga Grupo Esperantista

(Postĉeknumero 4835.33)

La 19-an de januaro, post plia leciono de la perfektiga kurso, la distriga parto de la kunveno estis dediĉata al portretludado.

La ĝenerala jarkunsido de la grupo okazis la 26an de januaro en multnombra ĉeest-

to, malgraŭ la ekstera malvarmeco. En sia morala raporto la prezidanto akcentis precipe la progreson ĝis 25 % en la membronombro, la fondon de loka Esperanto-Komitato Intergrupa (EKI) kaj signis kiel tujaj celoj por 1954 la kongresojn Beneluxan en Lieĝo kaj Universalan en Haarlem. Tiu raporto, same kiel la sekretaria raporto de S-ro Demeulenaere kaj la kasa raporto de F-ino Is. Van Parys, montris ke la grupo daŭre prosperas kaj ĉiuj tri estis varme aplaudataj. La ĉeestantoj reelektis la kvar ĉirantajn komitatanojn kaj aldonis al ili du novajn: F-inon Yolande Van Parys kaj Sron Hub. Schalembier. Diversaj proponoj de la membroj estis ankoraŭ kune ekzamenataj post kio la kunveno disiĝis en la plej bona spirito.

Dum la komitata kunveno de la 29a de januaro, la elektitaj komitatanoj dividis inter si la komitatajn postenojn jene: Prezidanto: S-ro Ch. Poupeye; Vicprezidanto: F-ino A. Boereboom kaj S-ro D. Demeulenaere; Sekretariino: F-ino Isabelle Van Parys; Helpsekretariino: F-ino Yolande Van Parys; Kasisto: S-ro Hubert Schalembier.

Dua halo de la nuna sezono okazis kun la kutima sukceso sabaton 30an de januaro. Malgraŭ la malvarmega temperaturo, tre multaj dancemuloj plenigis la salondon kaj bonege amuziĝis ĝis la 3a matene, je la nerezisteblaj ritmoj de la satata dancorkestro „The Moonliners”.

Muzika vespero agrabligis la kunvenon de la 2a de februaro; kelkaj artaj diskoj pri opermuziko, pruntedonitaj de F-ino Mantelers, estis aŭdigataj per la grupa diskaŭdigilo.

La dua elementa kurso de la nuna sezono estis malfermata la 5an de februaro. Kelkaj interesaj novuloj enskribiĝis.

La kunveno de la 9a de februaro estis tute dediĉata al komuna legado de „Belga Esperantisto”: kelkaj artikoloj servis kiel perfektiga ekzerco kaj la enigmoj kiel distrigo.

Dimanĉon 14an de februaro okazis en la hejmo de F-inoj Van Parys brile sukcesa filmvespero. Multaj gemembroj ĝin ĉeestis kaj post admiro de belegaj kolorfilmoj kaj saniga ridado por kelkaj ĉefverkoj

BRUGGE

BRUGES

Hôtel du Cornet d'Or

2, Simon Stevinplaats, 2

Centra situo - Moderaj prezoj

Moderna komforto

Sidejo de „Bruga Grupo Esperantista.”

Tel. 314.59

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

de famaj komikuloj, la ĉeestantoj sentis sin ĉiuj en plej gaja humoro kaj dancadis ĝis kiam, pro la tre malfrua horo, la festo devis esti haltigata per dankaj vortoj de la prezidanto al la afablaj gastigantoj Ges-roj A. Van Parys, gepatroj de niaj du viglaj sekretariinoj kaj al S-ro De Grave, kiu plezurige pruntedonis kaj funkciigis siajn aparatojn.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ordinara kunveno: ĉiumarde je la 20a, en la sidejo: „Gouden Hoorn- Cornet d'Or”, Simon Stevinsplaats 2.

La unua horo de ĉiu kunveno estos dediĉata al leciono de elementa kaj ripetiga kurso. Dum la dua horo de la kunvenoj:

MARTO: 2an: (Karnavalo) Ekskurso al la marbordo por karnavalaj festoj; 9an: Kanta vespero; 16an: Kartludado; 23an: Humorajoj; 30an: Surpriza vespero: ĉiu alportu nekonatan premion.

APRILIO: 6an: Komuna legado de B.E.; 13an: Parolata gazeto.

KONDOLENCOJ

Al S-ino A. DENYS-TACQUET, membrino de la Bruga Grupo, pro la morto de sia patro: S-ro Ch. Tacquet, la 13an de februaro.

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Postĉeknumero: 1230.48)

La kunvenoj estis multvizitataj kaj okazis laŭ la antaŭviditaj programoj. La 18an de januaro, nia nelacigebla samideano VanderStempel, sperte kaj humorplene gvidis la perfektigan kurson: la 25-an okazis la ĝenerala jarkunveno. S-ino Ernst, sekretariino, antaŭlegis la raporton pri la agado de la komitato dum la jaro 1953 kaj S-ino Plyson, kasistino, la finanĉan raporton, kiu montras favoran saldon. Ambaŭ raportoj estis plene aprobatataj.

S-ro Kempeneers, prezidanto, faris la finanĉan paroladon kaj tiam sekvis la elekto de la nova komitato por la jaro 1954. Ne nur la ĉeestantoj voĉdonis, sed ankaŭ multaj voĉdoniloj alvenis per la poŝto. Post kontrolo evidentigis ke la malnova komitato estas unuanime reelektita por la jaro 1954.

Por la bona ordo jen la nomoj: Prezidan-

to: D-ro P. KEMPENEERS; Vic-prezidanto: S-ro H. CASTEL; Sekretariino: S-ino E. ERNST; Kasistino: S-ino J. PLYSON; Helpsekretario: S-ro M. JIROUSEK; Programisto: S-ro R. JACOBS; Membrino: S-ino M. WEYN. La festkomitatano prezidas S-ino E. STAES, helpata de la tre spertaj Ges. WEYN, S-ino M. STERN kaj de aliaj membroj.

La 1-an de februaro, okazis nia kutima parolata gazeto, al kiu la gesamideanoj ĉiam tre vigle partoprenas, kaj la vetkuro por akiri premion en la formo de libro instigas la gesamideanojn al partoprenado kun interesaj artikoloj. La 8-an, estis la vico de S-ino Daems, kiu parolis pri „Virina Rubriko” kaj speciale pri „Mangpiloloj”, dank’ al kiuj kuirado ne plu necesas. La prelegantino rikoltis multe da sukceso, precipe ĉe la dommastrinoj. La 15-a estis dediĉata al gramatika vespero, gvidita de S-ro VanderStempel.

Programoj por la estontaj kunsidoj:

Aprilo: la 5-an: Parolata gazeto; la 12-an: S-ro Swinne: pri la stampado de banknotoj; la 26-an: F-ino Isaacsen pri „La Vivo sekreta de granda Magazeno”. Ni atentigas la gesamideanojn ke lunde la 19-an (Pasko) ne okazos kunveno.

VERVIERS

Esperantista grupo

La grupaj kunvenoj okazis dum januaro kaj februaro, kiel anoncitaj.

La tag-ĵurnaloj anoncis la malfermon de rapida kurso (3 monata), kiun S-ino Héron intencis gvidi en sia privata hejmo. Sed la lernantoj venis tiom multnombraj ke la grupo tuj postulis de la urbestro senpagan disponigon de klaso en iu lernejo, kio estis tuj akceptita.

Krom tio, kelkaj lernantoj enskribiĝis al la koresponda kurso de la Vic-Prezidanto, S-ro Kairis.

Sabaton 16an de januaro okazis informakunveno kaj ekspozicio ĉe la „avangardista” societo „L'Esprit”, antaŭ multnombraj kaj tre interesa publiko. Nia membro: S-ro A. Dohogne, urbestro de Cornesse, parolis pri la historio kaj strukturo de esperanto, kaj S-ro Héron pri la nuna pozicio de esperanto en la mondo. La sekretario de la invitanta klubo kontraŭparolis, dirante kelkajn malsaĝojn pri la neebleco por artefarita lingvo esprimi ĉiujn nuancojn de la penso. Tio naskis ĝeneralan debaton tre interesan, kaj ĉiuj kontraŭaj argumentoj estis nuligitaj: La tag-ĵurnaloj tre objektivis raportis.

La membraro, kiu preskaŭ duobligis dum 1953, jam nun pli ol duobligis por la nova jaro 1954a.

La 3an de marto, S-ro Demarche parolis pri Svisujo; la 17an S-ino Héron daŭrigis pri Jugoslavujo.

Jes, Sergento, ni alvenas

de Ch. Poupeye

(premiita en la Literatura Beneluxa Konkurso)

Kiam Henriko soldatiĝis, oni sendis lin al la Armea Ruĝa Kruco. Kial? Li mem neniam sciis, sed en la armeo oni neniam klopodu kompreni. Plie li esperis fari sian militan servon en sia propra urbo, sed, plia nekompreneblajo, jam la unuan tagon oni forveturigis lin al okupita Germanujo.

Tie li estis envicigata en tre malgranda hospitalo, hospitaletto vere, kie deĵoris nur dudeko da soldatoj sub la komando de duona dekduo da oficiroj kaj suboficiroj.

Dum la unuaj tagoj oni instruis lin pri la gradoj, la militista saluto, la militista punleĝaro: „la morto per la kuglo k.t.p.” kaj pri multaj aliaj sciindaĵoj. Fine post ok longaj tagoj da mallibero, li povis eliri por la unua fojo, iun dimanĉon posttagmeze.

Henriko jam konatiĝis kun simpatiaj kamaradoj kaj kun tri el ili, li forlasis la hospitalon kaj iris al malkovro kaj konkeri de sia tute nekonata garnizonurbo. La kvar amikoj baldaŭ laciĝis pri la admiro de diversaj monumentoj kaj direktis pli speciale sian atenton al kelkaj gajaj kafejoj, kien allogis ilin ĝoja muziko kaj kie blondharaj kelnerinoj, tiel ĝentile dirantaj: „Bitte schön!”, retenis ilin.

Niaj freŝbakitaj soldatoj gustumis la bonegan germanan bieron kaj baldaŭ agrable eŭforio montris al ili la vivon sub plej rozkoloraj aspektoj. Ni ne pretendas aserti ke la blondharaj kelnerinoj ne iom helpis kiel anĝeloj de tiu surtera ĉielo, sed ni ... ne estu maldiskretaj.

Ĉiokaze, ni povas diri ke kiam alproksimiĝis la deka vespere, la dirita eŭforio pli kaj pli pezis en la kruroj de la kvar hospitalaj musketistoj. Sed ili ne forgesis la horon de deviga reeniro, nek la „morton per la kuglo”.

Kun vira kuraĝo, la kvaropo forlasis abrupte tiujn Kapuajn ĝojojn kaj direktis sin plej rapide kaj preskaŭ neŝanceliĝante, ĉar firme brakon ĉe brako, al la militista hospitalo, kie ili alvenis kelkajn minutojn antaŭ la fata la horo.

Unu post la alia, streĉante ĉiujn si-

ajn muskolojn, la kvar soldatoj pasis antaŭ la gvardejo salutante plej precize kiel oni tion instruis; sed jen elsaltis suboficiro kaj kriis kun grandaj gestoj. Unue ili ektimis ne sciante kian malbonaĵon ili faris, kaj nur post dua alkrio ili komprenis la ordonon: „Vi kvarope, tuj supreniru al la malsanula ĉambrego de la dua etaĝo; estas mortinto tie, metu lin sur portilon, kaj portu lin en la mortintejon.”

Ili rigardis unu la alian kun longaj mienoj. Kia laboro post tiom agrabla dimanĉa posttagmezo! Du el ili rapide flustris al la aliaj ke ili ankoraŭ neniam vidis mortinton. Sed la bonĝustaj trinkaĵoj donis al la junuloj la necesan kuraĝon kaj plie estis ordonokaj soldatoj devas obei.

La kvaropo kuris do supren kaj efektive trovis en la dirita ĉambrego mortintan soldaton, terure palan en la blanka lito. Priskribi la multajn detalojn de tiu tragika kaj samtempe komika aventuro estus certe interesa sed tamen tro longe. Do resume: Ili prenis la malfeliĉulon el lia lito, metis lin sur portilon kaj kvarope kaj iom solene ili ekmarŝadis al la ŝuparo. Tie komenciĝis la malfacilaĵoj, ĉar dum la ok pasintaj tagoj ili kompreneble ne ankoraŭ lernis, kiel oni devas manovri brankardon sur ŝuparo. Por malsupreniri la unuajn ŝtupojn, tio sufiĉe glatis, la antaŭaj portantoj iom suprenlevis la portilon kiel decas. Sed venis la unua interŝuparo, kie la tuta komplekso devis do turniĝi kaj dume daŭre malsupreniri; kaj la ŝuparo kaj ankaŭ la interetaĝo estis iom mallargaj, ĉiokaze por ne ekzercitaj kaj iom ebriaj portistoj.

Iu puŝis, la alia tiris, la tria levis kaj la kvara mallevis la brankardon kaj subite la kadavro falis de la portilo kaj rulis sur la ŝtupoj ĝis la sekvanata ŝtuparplaceto: Kia katastrofo! La malfeliĉuloj jam vidis sin ĉiuj kvar antaŭ la militista tribunalo: „la morto per la kuglo”. Je la sama momento la suboficiro kriis de malsupre: „He, ĉu ĉio bona?” kaj senhezite, kun la kuraĝo de la malespero, Henriko respondis: „Jes, serĝento, ni alvenas! „ne

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

(Solvaj sendotaj al B.E. ĝis la 20.3.54)

Poentojn akiris por la n-roj 3 kaj 4: 5 p.: S-ino Ernst (Bruselo) kaj S-roj Ch. De Corte (Blankenberge), Jean Kairis (Stembert) kaj J. Soyeur (Seraing).

SOLVOJ.

3. Ebla solvo: splito; volumo; as-tero; strabi; admiri; torento; traktoro; impresio; karabeno; strigli; propozicio; kalibro; insigno; akcento; svarmi; rimarko; alterni; novico; avenuo; keiranto; insekto; lavendo; oscedi; observi; tomato; intesto; haringo; ekran; momento; inspiri; esplori; giganto; glazuro; sopiro. Post dorma trankvilo venas bona konsilo.

4. *Hor.*: kara, neto, vundi, tali, gurd, alegr, stud, ujet, insul, egala, rostr, anstataŭant, lorno, orgen. *Vert.*: emajl, apartig, anser, aviadil, najado, incens, urbano, nigrulo, slang, tirkest, retin.

aldonante ke la kadavro iris pli rapide ol ili.

Pro ektimo ili ĉiuj iom malebriiĝis kaj konstatis ke la portilo havas rimenojn per kiuj oni povas fiksi la korpon sur ĝi. Ili do rapide reatingis la malfeliĉan mortinton, kiu ŝajne ne grave difektiĝis, remetis lin sur la portilon kaj tiun ĉi fojon forte ŝnuris lin per la rimenoj. Tute certe li ne plu povos forkuri kaj ankaŭ tiun ĉi fojon ili alvenis ĉiuj samtempe, sen alia akcidento malsupre, kie ili solene demetis la kadavron en la mortintejo.

La serĝento rapide enrigardis tiun malĝojan ĉambron kaj vidante ke la laboro estis kontentige farita deklaris: „Rekrutoj, kiuj vi estas, vi ne malbone laboris, kaj laŭ la regularo de la hospitaloj, post transporto de kadavro ĉiu el vi rajtas dudek centilitrojn da portovino.”

Kaj efektive, post mallonga foriro, li revenis kun botelo kaj elverŝis al la kvar portintoj grandan glason da portovino, ne forgesante sin mem.

Ĉiuj kune amike tintigis la glasojn kaj la ĵus perdita eŭforio denove invadis ilin, tiagrade ke Henriko eĉ ris-kis: „Je la sano de la mortinto!”

La serĝento iom riproĉis: „Rapidu ĉiuj al via lito, vi ege bezonas ĝin!”. Ĉiam obeemaj soldatoj, ili, ĉiuj enligitis kaj baldaŭ ekdormis kun plej kvietaj konsciencoj.

2. *Hor.*: eterna, idolo, ĉarm, novicin, stratkanalet, areo, trib, rib, lu, plisimpligit, ostr, manipul, fripon, allog. *Vert.*: sorp, trajt, ilustr, rabi, rempar, skrap, tegi, arniko, mamon, op, invent, longa, ardi, oscili, gapul, ebli, ornat, utilig.

5. CIFERENIGMO.

Helpe de la subaj vortoj, rekonstruu 109-literan parton de poeziaĵo.

1) 5. 86. 50. 25. 76. 109. 8. 28. 62. 25. 83. 100. 75. — si zorgas pri la hejmo.

2) 84. 104. 87. 25. 102. 7. 39. 47. 70. 75. — kantbirdo.

3) 80. 103. 9. 17. 40. 25. 49. 90. 30. 75. — vorto imitanta bruon.

4) 51. 108. 2. 22. 4. 32. 25. 59. 77. 20. — ĝi pli grandnombra.

5) 64. 78. 1. 34. 66. 88. 31. 46. 92. 75. — seka frukto.

6) 33. 41. 74. 89. 93. 106. 3. 27. 75. — mildiga dirmaniero.

7) 61. 73. 25. 96. 15. 23. 36. 6. 75. — sendependeco.

8) 58. 91. 45. 25. 12. 42. 99. 52. 75. — oni uzas ĝin en balo.

9) 79. 69. 82. 11. 26. 48. 72. 29. 75. — li loĝas ĉe ni.

10) 55. 18. 38. 56. 94. 21. 85. 16. — ekstravagante komika.

11) 13. 35. 81. 14. 43. 95. 25. 75. — ekleziulo ĉe idolanoj.

12) 107. 53. 60. 101. 37. 10. 75. — subtile pistita substanco.

13) 71. 63. 98. 69. 19. 20. — deziri ne elspezi.

14) 65. 9. 44. 54. 11. 75. — birdo.

15) 68. 24. 47. 67. 75. — grenŝelo.

16) 97. 57. 105. 75. — grajno.

6. KRUCVORTENIGMO.

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11

| | | | | | | | | | | | |
|----|--|--|--|--|--|--|--|--|--|--|--|
| 1 | | | | | | | | | | | |
| 2 | | | | | | | | | | | |
| 3 | | | | | | | | | | | |
| 4 | | | | | | | | | | | |
| 5 | | | | | | | | | | | |
| 6 | | | | | | | | | | | |
| 7 | | | | | | | | | | | |
| 8 | | | | | | | | | | | |
| 9 | | | | | | | | | | | |
| 10 | | | | | | | | | | | |
| 11 | | | | | | | | | | | |

Horizontale. 1. deziri havi ion, kion alia posedas(R); oni ripozas ur ĝi. 2. ĉarmega. 3. nukso(R); trempi en bolantan akvon(R). 4. gladistino ĝin uzas. 5. ĝi kuŝas sur fundo de laĝeto(R); rompitaĵo el ruinigita konstruo. 6. par-

Radio

RADIO-ROMA.

Jen la detala programo por Marto:

- merkredon, la 10-an: 4-a Festivalo de la Itala Kanzono;
- vendredon, la 12-an: Leterkesto kaj bibliografio;
- merkredon, la 17-an: Karl VANSELOW, la verdstela trobadoro;
- vendredon, la 19-an: Italaj belartaj urboj: VENECIO;
- merkredon, la 24-an: Sardinia folkloro;
- vendredon, la 26-an: Giacomo PUCINI, okaze de la trideka datreveno de la morto;
- merkredon, la 31-an: Enrica CRES-CENTINI, itala poetino (Marzotto-premio 1953 Unua verko).

Prelegas: ĉiumerkrede: S-ro Luigi MINNAJA; ĉiuvendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA.

La dissendoj okazas de 18.50 h. ĝis 19.10 h., (M.E.T.) per ondoj: 31,35 m. kaj 49,92 m.

Atentu pri la nova adreso de RADIO-ROMA, Esperanto-Sekcio, Casella postale 320. ROMA (Italujo).

La redaktoro de ĉi-tiu rubriko publikigos kun plezuro la informojn, kiujn sendos la radio-stacioj al Michel PILLOY, c/o „ESPERANTO”, 18 rue de Franquenes, OTTIGNIES-Brabanto.

Korespondado

Juna esperantisto en Valonujo deziras kontakti flandrajn samideanojn kapablajn helpi lin per konsiloj pri disvastigado de Esperanto, propagandmetodoj, elektado de la plej taŭgaj propagandiloj, k.t.p. Li ankaŭ danke ricevos ĉiun pruntedonitan materialon por ekspozicio propagandcela, kiun li organizos la unuan dimanĉon de Majo. Skribu al: Théo SENOUSI, 12 route de Villers, TILLY (Brabant), kiu garantias respondon, kaj antaŭdankas ĉiun helpanton.

to de teksto(R). 7. projekti; parta ŝanĝo al leĝo(R). 9. ekzakta kopio(R). 11. energie; pene eligi(R).

Vertikale. 1. speco de subskribo(R). 2. instrumento de masonisto(R). 3. forte deziri(R). 4. mahometano(R). 5. fluajo uzata de kolorigisto(R). 6. trafikvojo(R). 7. en maniero senafekta. 8. fervore plenumanta sian taskon(R). 9. laŭ ĝenerala vidpunkto(R). 10. trumpeto(R). 11. plenumi sian servon laŭ difinita tempo(R).

Verantw' uitgever: Reĝa Belga Ligo Esperantista, De Bruynlaan 44, Wilrijk. Drukken: Krol. Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned.)